



AKTO-seminarioj: cele al plia profesiigo

Maritza Gutierrez González kaj Juan R. Rodríguez Gómez

Kun la celo plifortigi la enlandan agadon por Esperanto, Kuba Esperanto-Asocio okazigis la nacian renkontiĝon KERO 2015, - la 4-a eldono de tiu ĉi tutlanda renkontiĝo-, ĉi-foje okazinta en la centra provinco Villa Clara, inter la 18-a kaj 22-a de marto. La feriejo nomata Rivero Seibabo estis oportuna spaco, kiu arigis pli ol 100 partoprenantojn el 12 provincoj.

La seminario pri aktivula trejnado (AKTO) kiel kleriga kerno de la evento, ampleksigis la agadkampojn Konsciigo, Kapabligo kaj Komunumo (Utiligo) kaj ĝi sesiiis en tri labortagoj. En la matenoj okazis prezento de la temoj kaj posttagmeze la praktikaj sesioj kaj ateliero.



La adiaŭo: komuna foto

TAGO 1. INFORMADO: STRATEGIO

KAJ PRAKTIKO DE INFORMADO EN KUBO.

Oni prezentis panoraman prelegojn pri la lernado de fremdaj lingvoj en Kubo, kronologion pri historio de Esperanto en nia lando, kiel alproksimiĝi al la celpublikoj, nome, la potencialaj uzantoj, kiel verki pri Esperanto, kiel rilatiĝi kun la amaskomunikiloj, kialojn por lerni kaj kiel prezenti projektojn. Dum la posttagmezo grupe oni prilaboris intervjuon kvazaŭ rolludo, gazetaran komunikon pri KERO, plus skizan ellaboron de konkreta kulturprojekto.

Gvidantoj: Maritza Gutiérrez González, Juan Ramón Rodríguez Gómez, Hitchman Powell Escalona, Ariadna García Gutiérrez, Orlando Raola kaj Guillermo Sánchez Cordero.

TAGO2. INSTRUADO: STRATEGIO POR PLIFORTIGI LA KAPABLIGON DE LA KUBAJ ESPERANTISTOJ.

Oni prezentis prelegon pri la kursoj: kion fari antaŭ, dum kaj post la kursoj, pri scienca instruado kaj metodik-ateliero. Kunsidis la ILEI-sekcio okaze de la nova regularo aprobita (dum komitatsesio) kaj estis prezentitaj la agadlinioj de la sekcio por atingi la celon plibonigi la instruan laboron en la insulo.

Gvidantoj: Julián Hernández Angulo, Gonzalo Collantes García kaj Pedro Fernández Rodríguez.

TAGO 3. UTILIGO: KIEL PARTOPRENI LA INTERNACIAN MOVADON?

Oni prezentis prelegojn pri Esperanto kaj radioamatoroj, -kies agadon starigis la klubo de radioamatoroj de KEA (KLERA)-, pri



Ariadna García



Julián Hernández



Pedro Fernández



Gonzalo Collantes

Esperanto kaj komputiko; ankaŭ estis prezentitaj la aktivuloj kiuj fondos grupon de Esperanto- skrablo en KEA, tio estas, du membroj de la kuba federacio de tiu ludo, Arturo Alonso Tacoronte kaj Miguel Stevens Gómez, nunaj lernantoj.

Gvidantoj: Norberto Díaz Guevara, Javier Ramos Nistal.

Kiel konstato pri la praktika uzo de Esperanto en internacia agado estis prezentitaj la spertoj de kubaj esperantistoj en prelekturinoj, universalaj kongresoj, instruado kaj trejnkursoj, en landoj kiel Francio, Aŭstrio, Argentino kaj Brazilo. La prezentojn faris Miguel Ángel González, Gonzalo Collantes García, Francel Briel, Geomar Martínez Pérez kaj Ariadna García Gutiérrez.

Ankaŭ okazis aliaj paralelaj aranĝoj kiel paroliga kurso, skrablo kaj metamorfozo-ludoj; okazis eksterordinara sesio de la komitato de KEA kie estis aprobitaj la regularoj de la kuba esperantista junulara organizo (KEJO)

kaj la kuba ILEI-sekcio (KIS), kies estraro estis kompletigita. Ankaŭ estis aprobitaj, principe, la festotagoj de KEA laŭ la listo de UEA kun adapto al la kuba kunteksto.

Okazis KEA-ekzamenoj en la baza kaj meza niveloj. La ekzamenoj celas proksimiĝi la ekzamen-sistemon al la plej aktualaj praktikoj kaj laŭ la postuloj de la Eŭropa Referencakadro. Kunordigite de la provinca filio de KEA en Havano, oni plantis arbon de kakao.

La kultura programo estis abunda kaj ĝin gvidis Guillermo Sánchez Cordero kune kun la junulara sekcio; ĝi inkluzivis deklamadon, muzikon, teatraĵon, kantojn kaj balon en ĉiuvespera diskejo kiel kolofono de la kultura programo.

La pozitiva rezulto de KERO 2015 entuziasmigis la partoprenintojn, kiuj sin preparas por la 6-a kongreso de KEA okazonta inter la 18-a kaj 22-a de novembro en Havano, kiam ankaŭ venos al Kubo, la seminario AMO danke al UEA-kunordigo kaj subteno.

Eksterordinare sesiis la Komitato en 2015

Pedro Fernández

Dum KERO 2015 la Komitato de Kuba Esperanto-Asocio kunsidis celante aprobi la Regularojn de Kuba Esperantista Junulara Organizo kaj de la ILEI Sekcio, taskoj pendantaj pro tempomanko kaj lastaj modifoj.

Partoprenis 16 komitatanoj. Depost analizo kaj amendoj la komitato aprobis ambaŭ regularojn unuanime. Laŭ propono de Maritza Gutiérrez, estrarano pri informado, ni listigis gravajn datojn, kiujn ni devas omaĝi dum la jaro naciskale, ligitaj al la listo de UEA, temas interalie pri La Tago de la Gepatra Lingvo, la forpaso de Zamenhof, datreveno de KEA, Tago de la Unua Libro, kaj aliaj.

Ankaŭ ni kunsidis kun la geesperantistoj el Las Tunas, Villa Clara, Sancti Spíritus, Holguín kaj Ciego de Ávila, teritorioj kie ne estas filioj, kaj malmultas la membroj. Ni teame serĉis strategion por estonta laboro kaj nomumis la jenajn delegitojn:

Guillermo García Milián en Placetas, José Luis Montes de Oca Cárdenas en Villa Clara, Norberto Díaz Guevara en Sancti Spíritus kaj Anida Santiestéban Garcés en Las Tunas. Ili interkonsentis laboradi por plialtigi la membraron kaj en la venonta Komitato ni analizos ĉu ili plenumis la interkonsenton.

Festotagoj de KEA

(aprobata dum eksterordinara sesio de la komitato en Río Seibabo)

Februaro 21: Tago de la Gepatra Lingvo.

(tria semajno): Semajno Internacia de Amikeco (SIA)

Aprilo: 14 -23: Forpaso de Zamenhof kaj Tago de la hispana lingvo.

Junio 16: Datreveno de KEA. Agotago.

Julio 26: Tago de la Unua Libro.

Oktobro: 12, 18,20: Interkultura Semajno (tago de la Hispaneco, fondo de la unua E-asocio en Santiago de Cuba, kaj tago de la nacia kulturo.)

Decembro 15: Zamenhof-Tago

31-a komitatkunsido en Havano

Maritza Gutierrez

De la 30-a ĝis la 31-a de januaro okazis en la nacia sidejo, la 31-a komitatkunsido de KEA kiu arigis 18 komitatanojn plus reprezentantojn de la junulara sekcio kaj la ILEI-sekcio. La kunsido havis plenan laborprogramon kiu inkluzivis diskutojn kaj aprobon de la regularo de KEA, analizon pri la nuna stato de la asocio (FLAMO), seminarion pri administraj agadoj kaj informado kun bilda prezento pri la Teorio de Disvastigo de Novaĵoj, krom la tradician laboron pri la buĝeto kaj laborplano de la jaro 2015.

Dum la komitatkunsido efektiviĝis FLAMO-analizo kun la celo proksimiĝi al la realo de nia landa movado, temis pri analizo rilate al la konkurenca kapablo de nia organizo en sia agadkampo (ekstera situacio) kaj pri la karakterizoj internaj (interna situacio), kun la celo determini la Fortojn, Lamaĵojn, Avantaĝojn, Minacojn.

FLAMO

Dum la strategia planado kaj surbaze de la FLAMO-analizo oni provis respondi ĉiun el la jenaj demandoj: kiel ekspluati ĉiun forton? Kiel profiti ĉiun avantaĝon? Kiel haltigi ĉiun lamaĵon? Kiel defendi sin de ĉiu minaco? Partoj de la analizo rigardis al la ekstero kaj al la interno. Estis bona ekzercero pri komuna agado kaj diskuto pri nia propra realo kaj ni fariĝis pri konsciaj pri niaj fortoj kaj lamaĵoj, dum provos alfronti niajn lamaĵojn kaj minacojn laborante teame, sur bazo scienca kaj kun konkretaj proponoj pri trejnado kaj plia profesiigo en nia ĉiutaga laboro.

I-a komitatkunsido de la kuba junulara sekcio (KEJO)

La 29-an de januaro efektiviĝis la unua kunsido de la komitato de la junulara sekcio de KEA, kiu depost kelkajra agado sukcesis arigi entuziasman grupon da gejunuloj kiuj kunvenigis junulajn reprezentantojn por konsistigi la unuan komitaton de la junulara sekcio, kies nomo, laŭ estis decidite, de nun estos KEJO, kuba esperantista junulara organizo. Grava tasko pendanta restis tiam la aprobo de la regularo de la sekcio, sed oni konfirmis la decidon okazigi la junularan renkontiĝon JUSKA la venontan oktobron, en la provinco Santiago de Cuba.

Kakaujo por la estonteco

De la 18-a ĝis la 22-a de marto 2015 en la feriejo "Río Seibabo", en la provinco Villa Clara, okazis la nacia renkontiĝo de la kuba esperantistaro, kie la membroj de la Martí-Klubo "Patrio estas Homaro" en kunordigo kun la provinca filio La Habana plantis arbon, omaĝe al José Martí, nia nacia heroo, temis pri kakaujo.

La kunordigantino de tiu ĉi aktiveco estis Onoermis Acuña Velázquez, ĝenerala sekretariino de la provinca filio La Habana kaj membro de la Martí-Klubo. Partoprenis esperantistoj el Guantánamo, Santiago de Cuba, Las Tunas, Holguín, Sancti Spíritus, Villa Clara, Mayabeque kaj La Habana.

Ni okazigis tiun ĉi aranĝon kaj ankaŭ parolis kun la ĝardenisto, kiu kompromitis sin akvumi kaj flegi la arbon tiel ke, eble estontece, dum alia renkontiĝo ĉi tie ni povos fari alian kunsideton sub la ombro de la arbo, kiun ni mem plantis. Pedro Fernández Rodríguez



Pedro Fernández, Roberto Núñez kaj plantas kakaujon

Belarta Konkurso “Arto estas mi”

La Martí-Klubo “Patrio estas Homaro” invitas vin partopreni Belartan Konkursan “Arto estas mi”

Rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj en 2 kategorioj:

- spertuloj
- kaj nespertuloj kaj 3 branĉoj:
- poezio, dediĉita al José Martí, maksimuma longo je 2 paĝoj.
- rakonto, libera temo, maksimuma longo je 4 paĝoj
- Historio de Esperanto en Kubo, minimuma longo je 5 paĝoj. Povas esti artikolo, intervjuo, anekdoto, atesto.

Oni rajtas sendi nur du konkursaĵojn por sama branĉo. Oni sendu ilin en du ekzempleroj al:

Ismary Lezcano García/Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero / 10 de Octubre. La Habana

Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de decembro 2015. Vi devas meti vian nomon kaj familinomojn, identokarton kaj kompletan adreson.

Estos tri premioj en kubaj pesoj (CUP): por ĉiuj branĉoj kaj kategorioj. Oni informos la rezulton dum la 32-a Komitato de KEA

La premiitaj verkoj aperos en la bulteno esperanto.cu

MOVADA EVOLUO: NOTICARO

Informado pri Esperanto. La kuba esperantisto Alberto García Fumero, iama estrarano de KEA kaj ĉefdelegito, publikigis tre interesan artikolon pri Esperanto en la gazeto nomata Espacio Laical kiu ankaŭ estas trovebla en la retejo de tiu gazeto (www.espaciolaical.net) Li ankaŭ kreis e-blogon viziteblan en <http://interese.cubava.cu>

Esperanto en la radio. Roberto Nuñez, estrarano pri kulturo kaj informado de la provinco Filio La Habana, kiu laboras en la radiostacio Radio Rebelde, sukcesis aperigi reklamon pri Esperanto en tiu ĉi nacia radiostacio kaj ankaŭ en Radio Taíno

Raporto el Granma. La 12-an de februaro 2015, S-ino Ruth kaj ŝia filo vizitis Granma Provinca Filio, ni kune partoprenis bonajn momentojn kaj promenis kun ili tra nia urbo. Ni vizitis historiajn lokojn kiel la muzeo Carlos Manuel de Céspedes kaj aliaj. Ŝi konis multajn aferojn pri nia kulturo, vespere la 13-an ni renkontiĝis en la domo de Carmen Dubel, kie ŝi povis paroli kaj interŝanĝi ideojn, opiniojn, ktp, kun esperantistoj de Bajamo. Antaŭ ili foriris el nia provinco, ŝi diris al ni ke ŝi estis tre kontenta, ĉar trovis afablajn personojn kun entuziasmo, disciplino kaj amo por la movado kaj la lingvo, kaj dormis en bona lito. Okaze de la internacia gepatra lingvo S-ro Cabrera legis la mesaĝon de la Ĝenerala Sekretario de UNESKO kaj parolis en la radiostacio en la sekcio de Esperanto kaj ni publikigi ĝin en nia centra murgazeto en la kulturdomo de la urbo. Merkrede vespere en la sidejo ni interŝanĝis pri Esperanto kiel denaska lingvo kun esperantistoj kaj invititoj. Anyer Rafael Montero Ramos, Sekretario pri kulturo

Okaze de la tago de la gepatra lingvo: la 21-an de februaro

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



La dato koincidis kun la Havana Librofiro kiun partoprenis KEA per stando kie oni informis kaj varbis interesitojn por Esperanto. Ĝi estis bona okazo por rememori la alvokon de Universala Esperanto-Asocio rilate la gravecon de la gepatra lingvo en la defendo de la lingvaj rajtoj.

“Ni rediru nun tute klare: Esperanto estas nur dua lingvo por kontaktoj inter gentoj de malsamaj lingvoj, ĉiu el kiu rajtas kontribui al la monda kulturo siajn konceptojn kaj siajn pensojn. En monda skalo nia riĉeco estas nia varieco, sed sen lingvo, kiun ĉiu same povas lerni facile kaj pro libera elekto, nur malriĉeco kultura kaj unuformeco tutmonda sekvas”. Tiu ĉi eldiro estis esprimita de Renato Corsetti, iama prezidanto de UEA, lige al la okazo.

Li aldonis ke, Esperanto ne havas armeon, kiu disvastigas ĝin. Esperanto ne havas ekonomiajn interesojn, kiuj devigas homojn lerni ĝin. Esperanto ne havas kulturen industrion, kiu volas disvastigi siajn produktojn koste de lokaj alilingvaj produktoj.

Tamen, ni ĉiuj konscias kaj devas konsciigi la mondon ke, “Esperanto nur havas la forton de racio kaj de justeco, por kiu ĉiam pli multaj homoj libervole elektas ĝin por riĉigi sian internacian vivon, por koni aliajn kulturojn, por kontribui al pli justaj internaciaj rilatoj”.

En tiu ĉi kunteksto, KEA ankaŭ profitis la okazon disvastigi tiun ĉi idearon kiun la esperantistaro defendas en la nuna epoko, kiam estas sciate ke la konceptoj de identeco kaj kulturo tre ligitas al lingvo kiu malkovras la mondon propran kaj la eksteran. Esperanto ankaŭ rolas en tiu ĉi realo kaj proponas malferman vojon al interkultura kresko.

Mia kontribuo al Kuba Esperanto-Asocio

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ
GÓMEZ, Havano



★ Estrarano de KEA pri Kulturo kaj Historio ★ Li eklernis Esperanton en 1981 en la provinco Ciego de Ávila ★ Dum multaj jaroj laboris kiel redaktoro de diversaj gazetoj kiel Universo kaj Avanco ★ Verkadis pri la historio de Esperanto en Kubo ★ Prelegis en diversaj renkontiĝoj kaj ankaŭ dum prelegturneoj tra kelkaj landoj en Eŭropo kaj Ameriko. ★ Membris en la Amerika Komisiono de UEA en la jaroj 1994-2006 kaj partoprenis tutamerikajn kongresojn en Kostariko, Kolombio, Meksiko, Kubo kaj Kanado ★ Prizorgadis la bibliotekon kaj estas la historiisto de KEA kaj gvidanto de la komisiono pri Historio ★

Vizito de svisa esperantistino

Julián Hernández

De la 29-a de januaro ĝis la 26-a de februaro vizitis Kubon sinjorino Ruth van Puijfenbrork kaj ŝia 34-jara filo Dafht. Estis ilia unua vizito al nia lando kaj ili vojaĝis tra diversaj provincoj kaj renkontis esperantistojn. Post kelktaga restado en Havano kaj partopreni la komitatkunsidon de KEA okazanta en la nacia sidejo, ili konatiĝis kun pluraj aktivuloj kaj estraranoj landaj kaj provincaj; tuj poste ili vizitis la provincojn Santiago de Cuba kaj de tie al aliaj

urboj kaj provincoj, nome Guantánamo, Granma, Holguín, Ciego de Ávila, Trinidad kaj Cienfuegos. Laŭ rakontis Ruth antaŭ sia foriro, ili pasigis agrablajn tagojn inter ni kaj ĝuis la belecon de la kuba naturo kaj la gastamon de la kubanoj. Reveninte al Havano ili donacis du biciklojn, kiujn ili kunportis el Svislando, kaj al KEA kaj al kuba studento de la Havana Pedagogia Universitato. Sendube, plia kanto al amikeco de la esperantistoj.



Kun biciklo ĉe KEA

Santiago de Cuba: atesto pri elstara agado en 2014

Julio César Tamayo Salas, Prezidanto PF

La jaro 2014 estis tre fruktodona por la esperantistaro en Santiago de Cuba kaj Contraestre, rolantoj de la ĉefaj aranĝoj. Multe kaj pozitive influis la E-laboron en teamo flanke de ambaŭ estraroj, laŭ mia modesta opinio ni skalis pli profesion ŝtupon en la rilatoj inter ni kiel estraranoj, spite de la konsciaj malfacilaĵoj. Ni restu kune dum 2015!

La PF dum 2014 tenis regulajn kontaktojn kun internaciaj organizoj kaj kluboj kun kiuj oni interŝanĝis informojn, kiel Triesta Esperanto-Asocio en norda Italujo en ĝemeliĝo kun la PF ekde la jaro 1997, kaj EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) en Japanio de kiuj oni ricevis regule ĝiajn respektivajn informilojn TEA-Bul-tonon kaj GO-AMIKON.

De la 5-a ĝis la 9-a de marto la Provinca Filio en Santiago de Kubo, sukcese partoprenis en la 23-a Internacia Librofoiro omaĝe al Gertrudis Gómez de Avellaneda kaj dediĉita al Nersys Felipe Herrera kaj al Rolando Rodríguez García. Ĝi okazis en la Kongresa Centro Heredia kie oni montris al la publiko pli ol kvindek ekzemplerojn de la E-literaturo kaj kelkajn fotojn pri la 95-a Universala Kongreso en Havano 2010. Ankaŭ oni informis al la vizitantoj pri

Esperanto kaj oni disdonis flugfoliojn. Deĵoris ĉe la stando Gonzalo Collantes García (Ĝenerala Sekretario kaj kunordiganto flanke de la Provinca Filio ĉe la Preparkomitato de la Librofoiro), Miosotis Planas (Kasistino) kaj Julio César Tamayo Salas (Prezidanto de la PF). Partoprenis per arta prezento la muzikgrupo Amindaj kaj Frattoj EL, akompanataj de du belaj knabinoj (Anika kaj Mirelis), kiuj elstare brilis per siaj belaj kantoj.

Ni proponis por la venonta Librofoiro 2015, okaze de la 500-jariĝo de Santiago de Kubo prezenton de la libro El Esperanto en Cuba 1904 – 1976 (unua parto) de la aŭtoro Juan Ramón Rodríguez Gómez, kies antaŭparolon verkis la Historiino de la Urbo, d-rino Olga Portuondo Zúñiga.

La 6-an de decembro, kadre de la 20-a Datreveno de la fondiĝo de la E-Filio en Santiago de Cuba, la provinca estraro okazigis senteman aranĝon pro la grava, sinsekva kaj serioza laboro disvolvita dum 20 jaroj flanke de 4 estraroj, partoprenis en reprezento de la Nacia Estraro Juan Ramón Rodríguez Gómez, kiu liveris rekonon al la PF pro la 20-jara Jubileo kaj prelegis pri historio de E al la ĉeestantoj. Arte sinprezenti la projekto Amindaj kaj sia simbiozo “Teamo Bachata” akompanataj de la knabinoj Anika kaj Mirelis kaj de la kantisto Miguel Ángel, kiuj regalas belajn kanzonojn, ankaŭ kune de la repisto Jaime Ginarte, la deklamisto Carlos Ramón Morales kaj lokaj profesiaj kaj amatoraj trobadoroj el la urbo Santiago, kun kiuj ĉiuj pasigis agrablajn momentojn.

Holguín: la 13-a printempa festo

Isnel Pupo Peña

La 15-an de marto okazis en la socikultura projekto Bona Amiko la 13-a printempa festo por saluti la alvenon de la printempo, la poeziam kaj pupteatran tagon. Oni honoris la poetojn de la komunumo, la kantistojn de la printempo kaj aliajn novajn talentojn rezultintajn el la konkurso de Bona Amiko “Martí inter ni” kaj “Nia lerneĵeto” de Esperanto. La aranĝon partoprenis infanoj kaj aliaj membroj de la komunumo. Estis momento por esprimi solidarecon kaj pacdezirojn al la popolo de Venezuelo.

La Kultura Societo José Martí honorigis per la titolo “Honoris honoras” la esperantistan projekton Bona Amiko pro ties kultura agado favore al la infanoj per Esperanto kaj honore al la nacia heroo.

La Esperanto-grupo de Holguín, kies nomo omaĝas la fondinton de Esperanto en tiu urbo, Elvira Tapia Batista, kantis la himnon La Espero. Oni inaŭguris skulptaĵon metalan kun E-stelo kaj blanka floro kiel simbolo de la idea rilato inter Esperanto kaj Martí.

El la libroserva breto: kion legi?

Maritza Gutierrez

Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto. L.Zamenhof. Pri-notita de G.Waringhien. Eldonita de UEA, 1992 (18-a eldono). Ĝi apartenas al la Jubilea Kolekto, konsistanta el verkoj kiuj formas kulturalan fundamenton de la Internacia Lingvo. En sia antaŭparolo Waringhien esprimas ke, ...” la Fundamenta Krestomatio liveris riĉan provizon de diversaj tekstoj, konversaciaj, teknikaj aŭ literaturaj, kiujn tre bezonis la novaj varbitoj”.

En la antaŭparolo de la 17-a eldono W.J.Downes (akademiano), en la jaro 1954 skribis la jenon: “La unua eldono de Fundamenta Krestomatia aperis en 1903. D-ro. Zamenhof kompilis ĝin por ke ĉiuj esperantistoj havu modelon de stilo”. Multajn jarojn poste spertuloj konstatis ke la Fundamenta Krestomatia “devus aperi en elfunde reviziita eldono, por ke ĝi plue plenumadu sian originalan celon”. Post pluraj elprovoj, “estiĝis malhelpaj cirkonstancoj, ... la unuanima opinio estis ke la teksto restu senŝanĝa, sed ke oni indiku per piednotoj la ŝanĝojn, kiujn Zamenhof mem plejble aprobus. Tiun opinion oni efektivigis en la nuna eldono”.

Jen rekomendo por libroamantoj

Esperanto kiel heredaĵo estas internacia konkero

■ Roman Dobrzyński

La pola ministrino de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, prof. Małgorzata Omilanowska, decidis la 31-an de oktobro 2014 pri enskribo de la lingvo Esperanto kiel portilo de la Esperanta Kulturo en la Pollandan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

Kiel ĉiuj sukcesoj ankaŭ tiu ĉi havas multajn patrojn, sed mi menciuj almenaŭ la iniciatinton, nome K. Krzyżak. Li ekhavis la ideon pri Esperanto kiel heredaĵo, lanĉis kolektadon de apogsubskriboj de individuoj kaj institucioj sub la propono, kompilita laŭ enketilo akirebla ĉe la Nacia Instituto de Heredaĵo, kiu estas aŭtonoma fako de la Ministerio pri Kulturo. Al tiu ĉi adresato sendis la proponon la pola grupo Esperanto-Demokratio-Eŭropo (ADE). Iom pli frue (2012) fondiĝis Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton, gvidata de la senatano Edmund Wittbrodt, eksministro pri edukado.

Rezulte de diskutoj, konsultoj kaj ekspertizoj, kiujn partoprenis aro da personoj, multe modifiĝis la komence formulita propono kun la celo kongrui ĝin kun la nocio "nemateria kulturheredaĵo". Ĝia lasta versio nombris 37 paĝojn. Definitiva decido apartenis al la ministrino de kulturo, kiu aprobis resuman tekston de la enskribo sub jena titolo: La lingvo Esperanto kiel portilo de la Esperanta kulturo.

Portilo de la Esperanta kulturo

"Esperanto estas lingvo internacia, kreita de Ludoviko Zamenhof (1859-1917), naskiĝinta en Bjalistoko. Li publikigis en 1887 lernolibron, entenantan la principojn de tiu ĉi lingvo, kaj subskribis ĝin per la pseŭdonimo "Dr. Esperanto"; la vorto Esperanto akceptiĝis kiel nomo de la lingvo mem. Tiu ĉi artefarita lingvo sufiĉe rapide akiris sian propran vivon kaj iĝis la bazo de kreskantaj grupoj de ĝiaj uzantoj. Dum preskaŭ cent tridek jaroj surbaze de Esperanto la esperantista komunumo formis karakterizan vivkoncepton, inspiritan de la ideoj de Zamenhof, kaj ankaŭ kutimojn, tradicion, literaturon, simbolojn kaj eĉ siaspecan mitologion. Fondiĝis kaj plu funkcias multaj organizaĵoj kaj asocioj,

faciligantaj la subtenadon de kontaktoj kaj kunlaboron en agado ligita kun instruado kaj disvastigo de Esperanto kaj de ideoj ĝin akompanantaj. Inter la esperantistoj formiĝis forta identecosento kaj grupligiteco super la konscio pri nacieca aŭ etna aparteno. La fakto senti sin esperantisto implicas la agnoskon de difinitaj valoroj kaj mondkonceptoj.

Al la Esperanta tradicio apartenas Universalaj Kongresoj de Esperanto, ĉiujare okazantaj en alia lando, aŭ Artaj Konfrontoj (ARKONES), kies loko estas ĉiam Poznano. La saman tradicion konsistigas ankaŭ la memoro pri la kreinto de tiu ĉi lingvo, pri malnovaj Esperanto-medioj kaj ilia kontribuo al la Esperanta kulturo. Dum renkontiĝo de esperantistoj oni praktikas la kantadon de la himno, festparoladojn, rememorigajn rakontojn kaj primediajn anekdotojn. Ankaŭ la funebraj ceremonioj de esperantistoj okazas laŭ karakteriza maniero kun adiaŭo en Esperanto kaj ĉeesto de la Esperanta flago. Kiel festojn oni povas konsideri eventojn dediĉitajn al Ludoviko Zamenhof – la naskiĝan kaj mort-revenojn, respektive ĉiun 15-an de decembro kaj 14-an de aprilo.

En la lingvo Esperanto formiĝis propra frazeologio, idiomaĵoj, onidiroj, kiuj portas en si mem Esperantajn kulturvalorojn kaj specifaĵojn de tiu ĉi medio, kiel ekzemple la vorton "samideano". Ekzistas riĉa literaturo, kreita en tiu ĉi lingvo. La Esperanta mitologio entenas antaŭ ĉio stereotipajn imagojn pri la rolo kaj ebloj de Esperanto, troigan emfazadon de la facileco de la lingvo kaj kredon pri la "fina venko" t.e. universala enkonduko de Esperanto en interhomajn rilatojn.

La E-kulturo ampleksas ankaŭ komunumajn morojn kaj simbolojn kreantajn kaj subtenantajn la esperantistan identecon. La Esperanto-simbolo estas antaŭ ĉio blazono (la kvinpinta verda stelo), himno (*La Espero*), flago kaj la verda koloro de espero. La alia simbolo reprezentas la konturojn de la mondo (etendo de la lingvo en la mondo), manpremon (amikeco), la Babelturon (malebleco de interkompreno) kaj arbon, kiu simbolas kreskadon. Tiuj simboloj estas aplikataj al objektoj de ĉiutaga

uzo kaj memoraĵoj.

La definitivan vortumon de la propono pri enskribo de "La lingvo Esperanto kiel portilo de la Esperanta kulturo" en la 'Landan liston de la nemateria kulturheredaĵo' antaŭis socia konsultado, kiu fruktis per apogo al tiu ĉi iniciato flanke de esperantistoj mem kaj fare de simpatiantoj de Esperanto."

Kia heredaĵo?

En la supre citita teksto mankas kelkaj elementoj de la tipa Esperanto-propagando, dum estas troveblaj konstatoj, kiujn eble ne aprobas parto de la esperantistoj. Tamen oni konsideru, ke la citaĵo reliefigas tiujn aspektojn de nia afero, kiuj kongruas kun la difino de nemateria kultura heredaĵo laŭ la Konvencio de Unesko, akceptita de ĝia Ĝenerala Konferenco en 2003. Esence temas pri socia fenomeno, kiu entenas kulturvalorojn, heredeblajn trans generacioj fare de komunumo, posedanta sian identecon. Pollando ratifis la Konvencion en 2011. Komenciĝis inventarado de la koncernaj objektoj, por enskribi ilin en la pollandan Liston de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj. La liston fakte oni publikigis en 2014. Esperanto okupis sur ĝi la sesan lokon. Laŭdinda afero!

Mi ripetu, ke sur la Listo ne estas Esperanto mem, sed "Esperanto kiel portilo de la Esperanta kulturo". Tiun ĉi formulon, laŭ mia opinio, oni bone pripensis. Unue ĝi ampleksas kriteriojn de Unesko pri nemateria kulturheredaĵo. Due Esperanto montriĝas agnoskita kiel "kultura lingvo" fare de la ŝtata instanco. Kiom foje oni aŭdis, ke nia lingvo ne havas estontecon, ĉar mankas al ĝi kultura bazo! Trie oni oficiale rekonas la ekziston de la "Esperanta kulturo". Tio memkompreneble implicas ĝian internaciecon. Do montriĝas tute mistrafaj la voĉoj (ja tre malmultaj), kiuj aludas la "polan uzurpadon de Esperanto". Tiu ĉi decido de ministeria rango estas precedenco, kiu kuraĝigu la esperantistojn de ĉiuj landoj fari samajn proponojn, ne nepre kun la sama argumentaro, por instigi sian registaron sekvi la polan ekzemplon. Jen la vojo por levi Esperanton sur la liston de Unesko.



6-a Kongreso
KUBA ESPERANTO-ASOCIO
 Havano / 18-22 novembro 2015

Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco

Invito al 6-a kongreso

En la nuna tutmondiĝa procezo indas starigi kelkajn demandojn, ĉar evidentas ke multaj konceptoj suferas modifojn, kaj sekve, bezonatas postlasi antaŭajn viziojn fermitajn pri la diverseco. La konceptoj de kulturo kaj identeco streĉe ligitas en sociologio kaj antropologio. La identeco povas nur konsisti en la distinga alproprigo de certaj repertuaroj kulturaj kiuj ekzistas en nia socia medio, en nia grupo aŭ komunumo. Kiel oni povas proksimigi personojn kulture malsamajn, socie diversajn kaj geografie forajn? Kie estas la identeclandlimoj? Jen kelkaj demandoj kiujn ni provos kundiskuti kaj strategie alrigardi cele al plia klerigado de nia movado lige al la daŭripova lingva propono.

Aliĝilo
 kaj pliaj informoj
 haveblas de:
kubesp@enet.cu



La Kongresurbo

Havano estis fondita de la Hispana konkerinto Diego Velázquez en 1515, kaj ĝi naskiĝis kun la nomo San Cristóbal de la Habana sude de la nuna provinco. En 1519 okazis la translokiĝo al la norda haveno, kie ĝi troviĝas nun.

Dum jarcentoj Havano altiris la atenton de povaj landoj kaj de piratoj kaj korsaroj, kaj ankoraŭ videblas la tiama beleco el la muroj de la fortikaĵoj, el la fasadoj de malnovaj domegoj kaj preĝejoj, en la vastaj kaj imponaj avenuoj kaj en parkoj kaj ĝardenoj. La urbo havas tri ĉefajn partojn: Malnova Havano, Centra Havano kaj El Vedado.

Malnova Havano estis nomumita de Unesko Kultura Havaĵo de la Homaro en 1982, kaj ĝi havas la plej grandan nombron de historiaj konstruaĵoj. En la mallarĝaj stratoj, multaj ankoraŭ ŝtonkovritaj,

troviĝas konstruoj de la kolonia epoko, ĉefe de la tempo inter la 17-a kaj 19-a jarcentoj. La Placo de Armiloj, la plej antikva el la Havananaj placoj estas la koro de Malnova Havano, ĉar ĉirkaŭ ĝi formiĝis la unua vilaĝo. Tie troviĝas la Palaco de la Guberniestroj, nun Muzeo de la Urbo, kiu estas unu el la plej belaj konstruaĵoj de la urbo, kaj ĝi estis sidejo de la urbestroj dum preskaŭ 200 jaroj.

En Centra Havano troviĝas plej simbolaj lokoj de Kubo: la Muzeo de la Revolucio, la Nacia Muzeo de Belartoj, la Parko de la Frateco kaj la Granda Teatro de Havano.

El Vedado estas bela parto de la urbo, kun arkitekturo pli moderna kaj ankaŭ simbolaj lokoj kiel la Placo de la Revolucio, la Havana Universitato kaj la tombejo Kristoforo Kolumbo.

Havano kaj Esperanto: kelkaj eroj el la historio

La 15an de aprilo 1923 - post reorganizo de la landa agado, konsiderante unuavice propagandon -, okazas la unua radia Esperanto-disaŭdigo, pere de la radiostacio 2DW (strato Obrapía n-ro 93), nome disertacio de d-ro Alemán Ruiz, titolita "Bezono de internacia lingvo por radiotelefona komunikado". Ankaŭ kun la celo plidivastigi Esperanton, de la 31a de marto ĝis la 6 de aprilo 1924, SKPE okazigas Esperantistan Semajnon. Iom poste, inter 1926 kaj 1927, oni instruas la lingvon en la Popola Universitato José Martí kiel parton de la studprogramoj.

En la Havana Universitato, la poldevena studento s-ro Elias Johns (originale Johnovski) prezentis, la 14an de majo 1928, doktorigan disertacion titolitan "El problema de una lengua auxiliar internacio-

nal y su solución: el Esperanto" (La problemo de internacia helplingvo kaj ties solvo: Esperanto), kiu ankaŭ aperis libroforme.

Meze de la 40aj jaroj notindas E-espozicio kun kelkaj ĉi-rilataj dokumentoj kaj en 1947 somera kurso organizita en la Fakultato pri Sciencoj de la Havana Universitato. En tiu jaro, la delegito de UEA en Havano, s-ro Heriberto Cociña Cociña prelegas pri Esperanto, kune kun franca esperantisto en la Rondo de Amikoj de la Franca Kulturo.

Kaj meze de 1948 fondiĝis Kuba Esperantista Asocio, denove sub la gvido de Alemán Ruiz. Tiu asocio subtenis tre gravan hispanlingvan bultenon pri diversaj movadaj aspektoj en- kaj eksterlandaj.

Meze de la 50aj jaroj elstaras la agado de s-roj Pedro Pablo Lamas kaj Raúl Juárez Sedeno, respektive, en la provincoj Ciego de

Avila kaj Camaguey; ĉi-lastaj fariĝis reprezentanto de UEA en la lando. Ili nuntempe estas Honoraj Membroj de KEA kaj de UEA.

Fine de la sesdekaj jaroj, ĉe la Ministerio pri Edukado (MINED), aktivis Komisiono por Esperanto, kiu entreprenis precipe kompilon de informoj pri la IL kaj iamaniere propagandis la aferon ĝis 1971. Tiam en la ĉefurbo ariĝis kelkaj memlernintoj, kiuj komencis instrui la lingvon kaj en oktobro kunfondis Havanan Esperanto-Grupon, kiu en 1972 iĝis Havana E-Rondo (HER).

Referenca fonto: La poresperanta agado en Kubo (1904-2004), aperinta en la Kongresa Libro de la 6a TAKE, kaj verkita de: Juan Ramón Rodríguez Gómez, Komisiono pri Historio, Kuba Esperanto-Asocio.

El La lingva defio (1-a parto)

Claude PIRON

La teksto ĉi-sube afiŝita prezentas en Esperanto eltiraĵojn el la franclingva libro de Claude Piron Le défi des Langues, kun resumo de la partoj ne reproduktitaj. La leganto de ĉi tiu teksto tiel ricevos ideon pri la enhavo de la libro, kiu ekzistas ĝis nun nur en la franca (Parizo: L'Harmattan, 1994) kaj en la portugala (Campinas SP: Pontes, 2002)

I. Internacia lingva komunikado: ĉu patologia mastrumo?

Se individuo elektas senkiale agmanieron neutile penigan, elspezas gigantajn sumojn por akiri ion senpage disponeblan, rifuzas apriore informiĝi pri la efikaj rimedoj atingi sian celon kaj evitas pripensi pri tiu stranga maniero agi, oni diras familiare, ke mankas klapo en lia kapo. Se krome lia prefero por sen-kuraĝigaj klopodoj kaj komplikaj procedoj ricevas nur mezkvalitajn rezultojn, dum najbaro havas elstare bonkvalitajn per simpla kaj agrabla metodo tuj facile aplikebla, oni ne plu hezitos paroli pri masofismo. Ni apenaŭ tion konscias, sed la organizado de la internacia lingva komunikado niasocie meritas la saman diagnozon. Ĝi estas patologia.

Tiu aserto povas ŝajni aroganta. Ĝi tamen baziĝas sur analizo de la realaĵoj. La leganto tion konstatos, se li sekvos tiun ĉi raporton. Li ricevos ĉiujn indikojn por povi mem kontroli la faktojn.

(...) [Tiu patologia misorganizo de internacia komunikado elmontras, sociskale, ĉiujn trajtojn, kiuj karakterizas neŭrozon individuskale. Ĝi estos pritraktata en la sekvio de la verko sub la nomo "Babel-sindromo". La libro prezentiĝas kiel raporto de konsultodonaĵoj, fakuloj petitaj objektivaj esplori la mondan lingvoproblemon kaj proponi realismajn metodojn por solvi ĝin].

II. La problemo

Ĉapitro II prezentas la problemon. Ĝi komence pritraktas ĝin laŭ kvalita vidpunkto: lingva handikapo en komunikado inter simplaj civitanoj; en siaj rilatoj kun aŭtoritatoj aŭ oficialaj instancoj; en privataj internaciaj grupoj; en la rilato inter ŝtatoj. Ĝi poste traktas pri kvantaj aspektoj: kosto de tradukado kaj interpretado, kosto de instituciaj lingvaj servoj, ktp. Ĝi fine komparas la tre modestajn sumojn, kiuj sufiĉas en multaj kazoj por

respondi al urĝegaj bezonoj neglektataj pro "manko de rimedoj", kun la astronomiaj sumoj, kiujn kostas la nunaj lingvaj sistemoj al la socio ĝenerale kaj al la grandaj internaciaj institucioj aparte.]

lii. Mitoj kaj realo

Kiel ni vidis, la problemo prezentiĝas diversforme, laŭ la komunikantoj kaj la kladro, en kiu la komunik-bezono aperas:

- la koncernatoj ne sukcesas diri al si reciproke, kion ili volas diri;
- la mesaĝo transdoniĝas, sed koste de konsiderinda kvanto da frustraj, nervozigoj aŭ suferoj;
- la komunikado estas preskaŭ perfekta, sed tio kostis enorman investon tempan kaj penan al iuj el la partneroj (indas esplori, ĉu ekzistas sistemo kun pli avantaĝa rilato efikeco / kosto);
- okazas maljusteco, ĉar iuj ricevas la mesaĝon perfekte, kaj aliaj malbone aŭ tre malbone (ofta situacio en internaciaj renkontiĝoj, kie la anglalingvanoj, kelkfoje la franclingvanoj, ĝuas maljustan privilegion kompare kun la aliaj partoprenantoj; ofta situacio ankaŭ en la rilatoj inter loka aŭtoritato kaj homo el eksterlando: migra laboristo, rifuĝinto, vojaĝanto metitaj pro la situacio mem en pozicion malsuperan);

de la elsendita por egali, fakte, al trompo;

- la transdono de la mesaĝo kostas ekscesan sumon, tiel ke la amasiĝo de multlingvaj situacioj fine devojiĝas enormajn sumojn el tio, kio estus ilia normala celo en saĝa organizo de la mondo (alivorte, la rilato efikeco / kosto atingas ofte proporcion etike netolereblajn). (...)

[Tiu ĉapitro pritraktas diversajn mitojn, al kiuj aliĝas la socio en kampoj kiel elektronika tradukado aŭ lerneja lingvoinstruo.]

Tradukita de Vilhelmo Lutermano

Novjara mesaĝo (Fragmento)

Mark Fettes

Ni esperantistoj ŝatas festojn. Mi aprezas tiun econ; ĝi montras ion gravan pri la spirito de la lingvo kaj movado, iajn vivoĝojon kaj dankemon, kiuj certe helpis al ni travivi la lastan defioplenon jarcenton.

Tial estas taŭge malfermi ĉi tiujn jar-malfermajn pensojn per aludo al la 100-a Universala Kongreso, kiu post nur kelkaj monatoj bonvenigos homojn el la tuta mondo al Lillo, Francio. Tiu gaja evento estos ankaŭ la pinto de la Jaro Montevideo 60, okazo por priferi diversmaniere nian sesdekjaran kunlaboron kun Unesko. Ambaŭrilate, ni havas multajn kaŭzojn por ĝojo, multajn kaŭzojn por dankemo. Pensu nur pri tio, kiom kreskis nia kulturo dum tiuj jardekoj, aŭ kiom pli tutmonda estas nia komunumo, ol ĝi estis en 1905!

Temas do pri festa jaro, jaro animal-tiga, kiun bele simbolas la Lilla turo-pinto en la kongresa emblemo. Sed atendas nin ankaŭ laboro, ĉar ni troviĝas ankoraŭ longe for de niaj revoj kaj aspiroj. Gravas ne nur agnoski la atingitajn pintojn, sed ankaŭ elserĉi la eblajn turnopunktojn, kiuj povus malfermi novajn ŝancojn por nia lingvo kaj movado.

Tiurilate indas noti, ke 2015 estos grava jaro por Unuiĝintaj Nacioj, kiam diversaj plurjaraj streboj (pri edukado, pri evoluiĝo, pri klimatsanĝo) atingos sian kulminon. Interalie, la Jarmilaj Evoluigaj Celoj Jarmilaj Evoluigaj Celoj atingos sian limdaton kaj bezonos renovigon. Temas pri kolekto de la ĉefaj prioritatoj por la UN-sistemo kiel tuto; inter la Jarmilaj Celoj troviĝas i.a. la universaligo de baza edukado, la reduktado de infanaj mortoj kaj la provizado per pura trinkakvo. En la lastaj jaroj, la neceso interkonsenti pri novaj celoj post 2015 spronis vastan debaton pri la prioritataj direktoj de la evoluiga politiko, en kiu rolas konsideroj pri homoj rajtoj, daŭripovo, enurbigo, migrado, kaj aliaj nuntempaj tendencoj.

Do, kvankam mi komencis ĉi tiun mesaĝon parolante pri fiero, mi nun volas substreki la ekvilibrigan valoron de humileco. Ni havu memfidon, sed ne tro. Ni ne timu prezenti Esperanton kiel valoran rimedon por homa komunikado, kunlaboro kaj interkompreniĝo; aliflanke ni komprenu, ke ĝi devas trovi sian lokon en pli vasta strebaro por daŭripova estonteco. Se ni predikas dialogon, ni praktiku dialogon. Se ni serĉas la subtenon de aliaj, ni estu pretaj reciproke subteni ilin.

En tiu spirito, mi deziras al ĉiuj esperantistoj justan kaj dialogo-plenan novan jaron!



Claude PIRON (Namuro, Belgio) 26-a de februaro 1931 – 22-a de januaro 2008 (Gland, Svislando) estis svisa esperantisto, lingvisto kaj psikologo; de 1956 ĝis 1961 li ankaŭ estis tradukisto por Unuiĝintaj Nacioj (UN) el la ĉina, angla, rusa kaj hispana al la franca.

En Esperantujo, li nomis sin Klaŭdjo. Interalie, li estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA kaj membro de Esperantlingva Verkista Asocio.

Alproksimiĝo al la junulara movado: organizo

La junulara sekcio de KEA, kies prezidanto estas Carlos Ginarte, kreskis dum la jaro 2014 kaj havas la defion ne perdi la nunan grupon de entuziasmaj gejunuloj kiuj daŭre partoprenas la asocian vivon. La agado de la junulara movado en Kubo havas, interalie, la taskon organizi la eventon JuSKA 2015, kiu konfirmas la volon de la kubaj gejunuloj solidigi sian kapablon alstrebi plian organiziĝon kaj allogi pliajn gejunulojn kaj ankaŭ subtenantojn, tio estas, patronoj de KEJO. Dum la ĵusokazinta KERO en Rio Seibabo, estis varbitaj la unuaj patronoj. Dankon al ĉiuj kaj bonvenon al ĉiuj subtenantoj!



Elektronika Bibliografio de Esperanto-Artikoloj (EBEA)

La bibliografio aktuale enhavas indikojn pri proksimume 8000 gazetaj artikoloj. Pliaj 7000 estas prilaborataj kaj sekvas iom post iom; la artikoloj publikiĝis en diversaj gazetoj, en Esperanto aŭ naciaj lingvoj, ekde la jaro 1890 ĝis hodiaŭ. Temoj estas diversaj aspektoj de Esperanto, ĝia historio, movado kaj komunumo, specife interalie

- terminologio
- etimologio
- frazeologio
- gramatiko
- instruado kaj pedagogiko
- denaskismo
- biografioj de konataj Esperanto-parolantoj
- historio de Esperanto-organizo
- kongresoj

Apenaŭ aperas literaturo kaj poezio, malmultas ĝenerale scienca literaturo en Esperanto. Ne enestas libroj (monografioj). Tiuj estas troveblaj en la datumaro TROVANTO de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Detalan priskribon de la bibliografio EBEA en la germana lingvo oni trovas ĉe la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL).

La bibliografion kunmetis el pluraj partoj kaj pluflegas Bernhard Pabst; bonvolu sendi viajn komentojn, korektojn kaj aldonproponojn al Bernhard.Pabst@gmx.de (mane enmetu la signon @). La datumbazon kaj la serĉadon programis Gabi Rothe; leterojn pri la tekniko bv. sendi al ebea@esperantoland.org.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu.cu
www.esperanto.cu/cu



6-a Kongreso
KUBA ESPERANTO-ASOCIO
Havano / 18-22 novembro 2015

Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco



RADIO HAVANO KUBO
Kurtondaj kaj retaj elsendoj
www.radiohc.cu/eo



esperanto.cu estas trimonata eldonaĵo por komitatanoj, estraranoj kaj aktivuloj de KEA. Reta versio elŝuteblas de nia retejo www.esperanto.cu/cu. **Redaktis:** Maritza Gutiérrez, Alberto F. Calienes, kaj Javier Ramos.
Enpaĝigis: Yodanis Mayol kaj Alberto F. Calienes.



ESTRARA RAPORTO 2014

Per tiu ĉi raporto Kuba Esperanto-Asocio klopodas revui la plej gravajn agadojn de la jaro 2014, kiu estis grava startpunkto en la renoviĝo de agadlinioj kongrue al la nunaj postuloj priskribataj de la nova strategia laborplano de UEA.

Por KEA estis sukcesa plurdirekte, nome, en la retortiĝo de la julara sekcio, okazigo de eventoj kiel KERO 2014 komence de la jaro kaj JuSKA en oktobro. Revizio de gravaj labordokumentoj kiel la ĝenerala regularo, okazigo de seminarioj pri aktivula trejnado kaj

daŭra instruado tutlanda; tamen, la celo por plibonigi la instruka-pablon de la kuba instruistaro, retenon de la lernintoj, sistemigi la informan laboron kaj altigi la videblecon de nia asocio, igas nin ne ĉesi en nia laboro kaj starigi konstante novajn taslojn. Jen versio resumita de la dokumento prezentita dum la 31-a komitatkunsido de KEA okazinta la 30-an kaj 31-an de januaro 2015. Ĝi ankaŭ kunportas dankemon kaj instigon al la tuta aktivularo de KEA; dankemo pro la sindediĉo kaj entuziasmo; instigo al plua lernado kaj persisto.



1. ORGANIZAJ DEMANDOJ

Membrostatistiko 2011-2014

	Provinco / Kategorio	2011	2012	2013	2014	MS	Plano 2015	
1	Pinar del Río	4	5	17	2			
2	Artemisa	1	1	1	2			
3	La Habana	PF	219	193	215	189	18	201
4	Mayabeque		9	18	20	11		
5	Matanzas		2	20	14	7		
6	Cienfuegos	MG	23	17	21	11		31
7	Villa Clara		4	23	36	24	4	35
8	Sancti Spiritus	D	1	3	1	3	1	
9	Ciego de Ávila	D	7	9	1	1	15	
10	Camagüey		7	5	2	6		
11	Las Tunas		1		2	3		
12	Holguín	MG	20		10	32	20	31
13	Granma PF		55		33	45	53	60
14	Santiago de Cuba	PF	75	101	111	126	5	150
15	Guantánamo	MG	48	35	22	40	12	45
16	Isla de la Juventud	D	1	25	4	12	1	
	Honoraj Membroj		4	4	4	4		
	Amikoj de Esperanto		66	22	26	17		
	Totalo		541	522	582	531		568

2. FINANCO

Respondeca estrarano: Maritza Gutiérrez González

2.1. Enspezoj CUP: La plenumo je 82% de la planitaj enspezoj estis ĉefe influita de la okazigo de la tutlanda renkontiĝo KERo kaj sekvis la vendado de materialoj didaktikaj kaj libroj. Kotizo estas ankoraŭ ne kontentiga kompare kun la plano, sed ĝia potencialo daŭre estas relative favora, kio multe dependas de la konkreta agado en la koncernaj teritorioj. La planita membronombro ne estis plenumita, kio ja influis en la fina rezulto de tiu ĉi buĝetero, nur je 78%.

2.2. Elspezoj CUP: Koncerne al la elspezoj de la Nacia Sidejo plej rimarkindas la situacio pri elektro kaj telefono. Oni devas daŭre prizorgi efike uzi ilin, sed ja temas pri necesajoj por la funkciado de la ejo kaj la kontaktoj kun la movadanoj. La totala cifero restis je 85 % kompare kun la plano por la sidejo.

La elspezoj de la Nacia Estraro restis je 61% kompare kun la plano, interalie, ĉar la planita elspezo pro la financa kontrolo de CANCEC ne okazis kaŭze de burokrataĵo kiu malebligis al la koncerna instanco efektiviĝi la pagopeton; rezulte, ĝi estis farita senpage.

Ĝenerale, preskaŭ ĉiuj eroj restis sub la planita nivelo, escepte de la pago pro la retejo; la instrua fako ne uzis sian buĝetitan sumon en kubaj pesoj.

Resume, la evoluo de la spezokonto dum la jaro estis pozitiva, sed ne vere kontentiga, se oni komprenas ke la evoluo de la membraro ne estis plenumita laŭ la deciditaj kvantoj akceptitaj dum la pasintjara kunsido de la komitato.

2.3. Spezoj CUC: La evoluo de la spezokontoj estis ne plenumitaj, ne rilate enspezojn, nek pri la elspezoj; tamen, ĝi estis apenaŭ deficitita (-22.55), do, kovrita de la saldo en banko. La plenumo de enspezoj estis je 46% kaj same pri la totalaj elspezoj.

Stato de Libroservo fine de 2014

La provincoj pagis 3286.00 sed ankoraŭ ŝuldas 10991.00

3. INFORMA AGADO KAJ AKTIVULA TREJNADO

Respondeca estrarano: Maritza Gutiérrez González

3.1. Informa Agado

Estis entreprenitaj la jenaj taskoj:

Interne:

- Seminario pri Informado kadre de la Komitatokunsido okazinta kiel parto de la evento KERo 2014 en Viñales.
- Laboro por la renovigo de la retejo de KEA kaj ties aktualigo, kio restas ankoraŭ plibonigenda.
- Redakta laboro por la bulteno esperanto.cu kiu aperis 5-foje. Tiu-ĉe ni havis kunlaboron de redakto-teamo plus informoj senditaj de esperantistoj el la tuta lando.

Ekstere:

- Informa agado ĉe la stando de KEA dum la Internacia Librofoiro en Havano 2014.
- Informado pri la okazigo de KERo 2014 en la diversaj retlistoj de la internacia E-movado kiel landa-agado, ameriko kaj ret-info; sendado de komunikoj al radiostacioj kiel Radio Reloj kaj Radio Progreso; disvastigo tra Radio Havano Kubo kaj ties retejo.
- Artikoloj aperigitaj en la revuo Esperanto.
- Sendado de gazetara komunikoj okaze de la 35-a fondodatreveno de KEA al diversaj radiostacioj tutlandaj; intervjuo pri la datreveno en revuo On line de Radio Havano Kubo pri la agado de KEA.
- Pagita reklamo kontraktita ĉe la Kuba Informagentejo AIN, kiu afiŝis ĝin en sia hispanlingva retejo dum 3 monatoj.

3.2. Aktivula Trejnado: Okazis du seminarioj dum la jaro:

- Seminario por Aktivuloj pri Informado Librofoiro 2014 la 5-an de februaro en la sidejo de KEA sub la nomo La arto moderne pledi por Esperanto kun la celo trejni aktivulojn kiuj sekve deĵoris en la stando de KEA dum la Havana Internacia Librofoiro ekde la 13-a kaj ĝis la 23-a de februaro 2014.

La seminario havis aliajn subtemojn: kiel efike prezenti, informi kaj varbi por Esperanto kaj la praktika uzo de reklamilo; ĝin ĉeestis pli ol 20 havananoj; oni prezentis aŭdvidan materialon por havi ĝeneralan bildon pri tipaj demandoj kutime alfrontataj de la esperantistoj ĉe publikaj sinprezentoj. Ekestis eta debato kaj sperto-interŝanĝo, klarigoj pri eblaj misinformoj en la ĉiutaga laboro pledi por Esperanto, aktualigo pri la informa agado kongrue al la nunaj konceptoj starigitaj en la strategia laborplano de UEA, i.a.

La partoprenantoj ricevis dosieron paperan kaj en cifereca versio de gravaj materialoj kaj dokumentoj kiel la Manifesto de Prago, Gvidlinioj pri informa agado, tekstoj de Claude Piron kaj aliaj pri KEA kaj Esperanto en Kubo.

Temis pri la unua tiuspeca seminario lige al la publika laboro de KEA en la librofoiro. Pri tiu ĉi seminario ni sendis artikolon al la revuo Esperanto kiu publikigis ĝin en la aprila numero.

- Aktivula Trejnado okazis kadre de KERo 2014 kaj partoprenis pli ol deko da aktivuloj. La temo estis Konsciigo kaj Kapabligo en la praktiko: kiel komuniki efike? Kaj kiel verki artikolon por la gazetaro.

La Seminario pritraktis kernajn elementojn de la informa agado kaj celis instigi kaj aktualigi aktivulojn cele al pli kvalita laboro surbaze de la esencaj agadkampoj de la nova Strategia Laborplano de UEA. Ni klopodis skizi la informan laboron por la jaro, tamen, ne sukcesis aktiviĝi la planita komisiono pri informa agado por la tuta lando.

4. INSTRUADO

Respondeca estrarano: Julián Hernández Angulo

Dum 2014 la estrarano daŭrigis la laboron por multe pli unuecigi la instruagadon tra la lando. Por atingi tiun ĉi celon, li okazigis kunsidojn kun la Havanaj instruistoj en kiuj li pritraktis interesajn temojn ne nur lokajn sed naciajn. Oni sendis la protokolojn al ĉiuj instruistoj kaj ciferece kaj papere. La estrarano ankaŭ havis kontaktojn kun pluraj instruistoj kaj sendis materialojn diversajn. Li laboris en kunordigo kun la nacia respondeculo de la ILEI-sekcio kaj kun la ofiĉistoj de la Nacia Sidejo kiuj multe helpis.

Fine de 2013 kaj komence de 2014, oni faris alvokon por la KEA-ekzamenoj kiuj okazis dum la Tria KERo en Viñales. Trapasis la mezan kaj elementan ekzamenon 6 kaj 8 kandidatoj respektive. Oni ankaŭ okazigis konkursan ekzamenon en kelkaj provincoj. Dum tiu ĉi nacia renkontiĝo, instruistoj el la tuta lando kunsidis kaj interkonsentis preni en konsideron la postulojn de la Eŭropa Referenckadro por taksii la progreson de la lernantoj. Kursfinintoj de la baza kurso minimume atingu nivelon B1. Okaze de la Tago de la Instruantoj, la Nacia Estraro stimulis ĉiujn instruistojn tra la lando per libroj.

Dum la periodo la estrarano reviziis la Ekzercaron de la Unua Nivelo por nova reeldono kaj laboris en la lernolibro por hispanparolantoj. Li daŭre registris diplomintojn de la baza kurso en la koncerna registro.

Komence de la jaro, li gvidis intensan kurson en Managvo, Nikaragvo invitate de Fondaĵo Esperanto. Li partoprenis la Unuan Internacian Nikaragvan Kongreson, kie li gvidis kaj konversacian kaj ekspresan kursojn. Dum la jaro kelkaj instruistoj ankaŭ gvidis ekspresajn kursojn, ĉefe en Havano.

Li partoprenis dufoje en la radioprogramo Más de Dos en Radio Metropolitana kie li parolis pri Esperanto.

5. KULTURO

Respondeca estrarano: Juan Ramón Rodríguez Gómez

Tuj post la okazigo de la 30-a Komitatkunsido en Viñales, kie mi reeniris en la KEA-Estrarano, dum kelkaj monatoj, mi preskaŭ dediĉis la tutan tempon al finpretigo de la libro *El Esperanto en Cuba (1904-1973)*, ne nur kiel aŭtoro, sed ankaŭ kiel eldonisto kaj revizianto, kaj atentis ĝian enpaŝigon.

Krome, kiel jam delonge, mi daŭrigis la agadon kiel respondeculo de la Komisiono pri Historio de Esperanto en Kubo, kies teamo laboris dum la jaro, ĝis fini la precizan kontrolon de la tuta dokumentaro (1903-2014).

Ankaŭ kiel parto de la agado pri nia historio, mi redaktis kvin artikolojn por la bulteno *esperanto.cu*: tri rilate al centjariĝoj kaj 2 pri la Honoraj Membroj de KEA. En tiu ĉi lasta senco, mi ankaŭ adresis leterojn al Rosa Castañeda Guerrero kaj Rafael Cabrera Espinosa (al kiu mi petis informojn pri Socorro Castro).

Alia grava tasko dum la jaro temis pri la reklasifo kaj reordigo de la biblioteko de KEA, kies ĉefan taskon entreprenis kamaradino María Antonia Martínez Cartaya, kiu sukcesos pretigi (manskribite) novan librokontrolon. Mia laboro en tiu afero iris en la direkton regi ĉion, sed krome helpi ŝin kaj kunarangi la reklasifon de la libroj kaj aliaj materialoj. Pri la la kontrolo de la gazetaro, mi mem agis dum 2014, ĝis kontroli ĉiujn el ili en la respektivaj bretoj kaj cifereca versio de ĉio, aktualigita ĝisdetale.

Aliaj aferoj, dum 2014 estis:

- Du vizitoj al Santiago de Kubo: la unua (aprile), pri aferoj rilataj al publikigo de *El Esperanto en Cuba* (kontaktoj kun la provinca direktorino pri Kulturo, la direktorino de la eldonejo Oriente, kaj la historiistino de tiu urbo, kiu estis pretiginta la antaŭparolon de la libro). Oni profitis tiun viziton por kontakti la Direktoron de la Departamento pri Aplika Lingvistiko, el kio fontis lia decido kunaŭspicii Lingvistikon Simpozion, organizotan de ni por la 6-a Kongreso de KEA, tiamomente planita okazi en Santiago, dum marto 2015. La dua vizito (decembre), okaze de la dudekjariĝo de la loka Provinca Filio

6. FAKA KAJ SCIENCA AGADO, UTILIGO, ĜEMELAJ URBOJ

Respondeca estrarano: Miguel Ángel González Alfonso

Dum 2014 ni eklaboris sendante cirkuleron al ĉiuj grupoj kaj filioj por la proksimiĝo de ĉiuj fakgrupoj kadre de la geesperantistoj, sed malmultaj reagoj alvenis,

Ekde marto 2014 estiĝis rilatoj kun KLERA (Radioamatoroj) kadre de Kuba Esperanto-Asocio, ili sendas informojn regule sed ne sendis ankoraŭ la monatajn protokolojn kaj la liston kun ĉiuj personaj datoj de la radioamatoroj de la sekcio, ankoraŭ mankas la alveno de la jara raporto 2014 ĉar ili kunvenos ĉe Santiago de Kubo dum decembro 2014 kadre de Esperanta evento. Ĉe Villa Clara (Santo Domingo) la kuracisto Raisel García strebas arigi esperantistajn kuracistojn, tamen ne estas multaj interesitoj ĉar la informitaj gekuracistoj ekster la movado dediĉas pli da tempo al lernado de aliaj fremdaj lingvoj, tamen ĉe nia movado estas kelkaj kuracistoj kiuj jam lernis Esperanton, do ni eklaboru kun ili, tiuj gekuracistoj estas el Havano, Cienfuegos, Villa Clara, Santiago de Cuba, Guantánamo, ktp.

Rilate al Ĝemelaj urboj oni jam ekfaras demarŝojn por oficiale unue ĝemeliĝi kun la provincoj Granma kaj Santiago de Kubo por poste ĝemeliĝi kun aliaj urboj de la ekstera mondo.

La bona uzo de la lingvo skriba kaj parola prestiĝos nian Asocion, kiu dum pli ol 35 jaroj divastigas Esperanton kaj pledas je la plialtigo de la lingva nivelo de ĉiuj niaj asocioj.

7. JUNULARA SEKCIO

Raportas: Carlos Manuel Ginarte, Prezidanto, Junulara Sekcio

La Junulara Sekcio de Kuba Esperanto Asocio (JSKEA), fondita la 1-an de junio 1988, havas kiel ĉefa celo: varbi kaj kunigi la kubaĵn gejunulojn por disvastigi esperanton tra la tuta insulo. Kiel landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), prioritato estas establi kaj prizorgi kunordigojn kaj eksterajn rilatojn; kontaktante, interŝanĝante kaj kunlaborante kun TEJO kaj kun aliaj Landaj Sekcioj.

Dum la komenco de la jaro 2014, okazis novjara aranĝo de JSKEA en Havano kun la celo rearigi kaj reaktivigi la junularon de tiu ĉi provinco kaj daŭre informi pri la novaj elektoj kiuj okazis poste, la 25-an de januaro. Tie nova estraro estis elektita.

Komence de januaro estis lanĉita la konkurso “Propra bildo”, kiu celis krei emblemon kiu reprezentus la sekcion.

En februaro, gejunuloj aktive varbis por Esperanto dum la 23-a Internacia Librofoiro en Havano kaj en Santiago de Kubo.

En marto, kadre de la Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERO) la novelektitaj estraranoj kunsidis kun la junularo por analizi, organizi kaj taksu la laboron en la diversaj filioj tra la lando.

Dum KERO 2014 la junularo tre aktive partoprenis dum la artaj vesperoj kaj en aliaj programeroj.

Post KERO, la JSKEA-estraro entreprenis la grandan taskon kunorganizi la 3-an Junularan Someran Komunan Aranĝon (JuSKA 2014) serĉante naciskalecon por la aranĝoj de la junularo.

En TEJO ni havas 2 komitatanojn: Geomar Martínez Perez (Komitatano A) kaj Ariadna García Gutiérrez (Komitatano B). Krome ni havas individuajn membrojn de UEA kaj TEJO.

Dum 2014, JSKEA ne raportis al TEJO pere de la monataj komitatataj cirkuleroj dum 9 monatoj.

La reprezentantoj de JSKEA en ĉiuj provincoj devas esti lumturoj kiuj daŭre gvidas la laboron kaj aktivigas la junularon. Ili devas studi por plibonigi sian lingvonivelon kaj kunlabori por starigi novajn kursojn, varbi homojn, trejni, motivigi al kreado de pliaj junularaj kluboj, kontroli sian membrostatistikon, kunsidi, organizi aranĝojn lingve kaj komunumcele, sufiĉe profesie kaj konscie labori, ofte raportu kaj fluece komunikiĝi kun JSKEA-estraranoj.

Ĉi jare ni planas organizi JuSKA-n 2015 por la kvara fojo, kiu estas la Nacia Evento de la Kuba Esperantista Junularo.

8. AGADO EN FILIOJ / GRUPOJ

Ĉiuj reprezentantoj de provincoj raportis pri la laboro farita dum la pasinta jaro kaj la plano por la jaro 2015. La plej elstara provinco estis Santiago de Cuba.

La Habana

La prezidanto de la PF Havano rezignis, kaj laŭstatute oni devis okazigi elektojn. Ili okazis la 17-an de januaro. La elektita estraro estas:

José Evelio Cárdenas Zúñiga	Prezidanto
Onoermis Acuña Velázquez	Ĝenerala Sekretario
Yamilé Valle Sosa	Kasisto
Roberto Hilarío Núñez Silva	Kulturo
Yordán Fonseca Olivera	Instruado

Kroma komitatano elektiĝis Cirilo Ramos Piñero.

Dum la jaro okazis diversaj E-kursoj en la Nacia Sidejo de KEA, samkiel en Centra Havano kaj Regla.

Havanaj esperantistoj partoprenis diversajn E-eventojn en la lando kaj en la monataj renkontiĝoj en la Nacia Sidejo de KEA.

Cienfuegos

Raportas: Alina Zuaznabal Himely kaj Denia López Fuentes

Disvastigo: Nuntempe ni havas grupon nur en municipo Cienfuegos kaj ni inkluzivas kelkajn membrojn el aliaj municipoj. Per provinca radio kaj televidilo ni informas pri kursoj, eventoj kaj ĉefaj E-datrevenoj. Ankaŭ ni havas esperantiston tiel radioamatoro kaj li estas membro de ILERA kaj li povas komuniki per radio.

En junio ni okazigis la 11-an Centran E-Renkontiĝon for de la ĉefurbo kun la celo ke la loĝantaro de tiu urbeto konu pri E. En nia renkontiĝo partoprenis 33 geesperantistoj el diversaj provincoj. Kiel oni povas konstati, Santiago estis la provinco kiu havis pli da partoprenantoj.

Oni estis plenuminta programon kun prelegoj pri Historio de la urbo Cienfuegos, ekskursoj kaj promenado al Botanika Ĝardeno, Kastelo Jagua; veturo al la plaĝo Rancho Luna kaj interŝanĝo kun la popolo de la urbeto "Ciudad Nuclear". Bedaŭrinde pro malbona komuniko niaflanke geesperantistoj el Villa Clara n Villa Clara

Santo Domingo

Raportas: José Luis Montes de Oca Cárdenas
(Delegito)e povis ĉeesti nian eventon.

Ni aranĝis grupon da gelernantoj, 14 entute, estas 3 instruistoj: Raicel, ankaŭ instruanta al lernantino, kiu suferis akcidenton kaj ne povas ĉeesti, li iras en ŝian domon. José Luis Montes de Oca kaj Julio César Díaz Casañas gvidas konversacian rondon. La propagando pri la Ekspresa Kurso ne estis fruktodona.

Las Tunas

Raportas: Rafael Cabrera Espinosa, Komisiito
por la Orienta Regiono

Mi veturis al Las Tunas la 28an de novembro, akompanata de Daniel Rodolfo Reyes Cañete, membro de la Nacia Komitato de la Junulara Sekcio. En la stacidomo ni estis akceptitaj de Juan Miguel, kun kiu mi kunordigis la viziton. Poste ni ĉiuj restis ĉe li. Poste venis Maikel kaj Anida, kiuj interesiĝas aliĝi al la asocio. Kun ili Daniel kaj mi interŝanĝis niajn spertojn kaj parton de la vivo en la movado.

En la domo de Juan Miguel ni ĉiuj tagmanĝis kune kun lia patrino. Poste vespere ni vizitis Reinaldo Fontaine en sia domo kie mi klarigis kelkajn dubojn pri la gramatiko kaj parolis pri la celoj de la Asocio kaj la problemoj pri la kreskado en la provinco. Poste Anida invitis nin vespermanĝi en sia domo kie ni praktikis la lingvon.

La 29an matene denove ni renkontiĝis kun Juan Miguel kaj Maikel ĉe la unua, kie mi difinis mian celon pri la vizito, kaj la instrukciojn de la Prezidanto de KEA pri la movado en la provinco. Ili kaj ni interŝanĝis pri la situacio, sed mi vidis entuziasmon inter ili por labori en la kreskado de la membraro. Mi rekomendis kiel ili povas fari disvastigon, por ke la publiko konu, ke la Asocio ekzistas en Kubo.

Poste en la sama mateno Juan Miguel kaj Maikel akompanis nin ĝis la stacidomo por reveni al Bajamo.

En urbo Las Tunas jam estas 3 membroj de KEA, nome: Juan Miguel, Maikel kaj Anida.

Holguín

Raportas: Isnel Pupo Peña (Prezidanto)

La grupo havas 20 membrojn. Estas kurso kun 8 gelernantoj kaj du geinstruistoj: Isnel Pupo Peña kaj Magda Rodríguez Almaguer. Ni havas rilaton kun la loka radiostacio. Ni aranĝis ekspozicion en la

Parko "Bona Amiko", en la Biblioteko "Alex Urquiola" kaj aliaj institucioj. La Projekto "Bona Amiko" partoprenis en multaj komunumoj kaj kulturaj institucioj disvastigis kaj instruis la internacian lingvon.

Granma

Raportas: Frank Michel Cedeño Estrada, Prezidanto

Internaciaj rilatoj, kontaktoj, ĝemeliĝoj, interŝanĝoj. Ni kontaktis kun la kluboj el Stokholmo, Sudafriko, Francio, Pollando, Kongo, ktp, kaj aliaj izolitaj eksterlandaj esperantistoj.

Amikoj de Esperanto (individuoj kaj juraj personoj). La amikoj de Esperanto en nia filio laboras por kontribui al la evoluo de la movado.

Perspektivoj: Daŭrigi la rilatojn kun aliaj kluboj kaj esterlandanoj, por ke ili konu pri la laboro en Granma.

Santiago de Cuba

Raportas: Julio César Tamayo Salas, Prezidanto PF

En la urbo Santiago de Cuba instruis Eon 3 instruistoj, ili estis: Gonzalo Collantes García (rapida kurso); Guillermo Navarro Toledano (rapida kurso); Julio César Tamayo Salas (postbaza kurso). La lernejo kie oni instruas e-ton estas en la sidejo de UNAICC.

En Contramaestre instruis e-ton tri geinstruistoj, ili estis: Graciela Morgado Rodríguez (regula kurso), Jaime Ginarte Díaz (regula kurso), Guillermo Sánchez Cordero (porinfana kurso).

La registrolibro de diplomitoj en la PF atingis la ciferon de pli ol 500 diplomitoj.

Rimarkinda sciigi ke pro sia profesia, serioza kaj respondeca laboro, la instruisto Gonzalo Collantes García estis nomumita en Vinales Pinar del Río, dum la kunsido de instruistoj kiel nacia ILEI-reprezentanto.

Ankaŭ Gonzalo restis en Brazilo dum tri monatoj instruante Esperanton al gejunuloj en la urbo Maceió, Ŝtato Alagoas kie li ricevis ateston pro la sukceso de kurso.

La 30-an de aprilo 2014 instruisto Guillermo Navarro en kunordigo kun la prezidanto de la PF okazigis la Unuan Olimpikon pri konjo de Esperanto ĉe UNAICC Santiago de Cuba

Guantánamo

Raportas: Tania Laurencio Molina, Prezidanto MG

Disvastigo

Nuntempe oni havas nur membrojn en municipo Guantánamo, sed en nia perspektivo estas labori ĉi-jare en municipo Imías. Nun ni laboras kun geinfanoj de la baza lernejo Blas Roca Calderío. Estontece tiu rilatoj devas plialtiĝi kaj pliboniĝi ĉar la lernejo mem havas grandan intereson en la plialtigo de la bonstato de siaj gelernantoj. Ankaŭ komenciĝis la instruado en municipo Caimanera, sed la afero ne bone sukcesis.

9. INSTRUADO

Ĉi-momente instruas en nia provinco tri instruistoj:
Leonardo Luna Neyra, Raúl Sanchez Guilarte
kaj Tirso Ávila Bory.

Ĉiuj uzas diversajn materialojn por instrui, t.e. bildoj, realaj objektoj, desegnaĵoj, komputiloj, presitaj materialoj ktp.

Ekzistas la librokontrolo de la diplomitoj, sed oni devas aktualigi ĝin. Ambaŭ instruistoj havas bonan lingvan nivelon.

Venontjare ni komencos superajn kursojn por diplomitoj.

Ni uzas prunedonitajn lernoĉambrojn de la ekonomia lernejo Capitán Asdrúbal López Vázquez, lokita en strato Los Maceo kaj Varona, Guantánamo. Tiu loko havas sufiĉajn kaj komfortajn lernoĉambrojn